

REDAKCIO:
PRAHA II. DITTRICHOVA UL. 7. BOHEMUJO.
ED. KÜHNL.

5. VII. BOHEMA REVUO ESPERANTISTA. 1913.

Cena: 30 hal.

Nepovažujeme za povinnost odpovídati na dotazy, k nimž nebyla přiložena známka na odpověď.

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ
BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

Kun literatura aldono

LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de
CENTRA ASOCIO
BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.)
(OFICEJO: PRAHA II., VODIČKOVA ULICE 38.)

Vychází 10krát ročně (kromě prázdnin).
Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk a vrací netištěné rukopisy, byla-li přiložena známka; práce původní mají přednost.
Předplatné v Rakousku 3 K, pro cizinu Fr. 3·75 = $1^1/_2$ Sm.
Účet pošt. spoř. 93.281.
(Prosíme o adresy přátel Esperanta, kterým bychom mohli zaslati s úspěchem ukázkové číslo.)

Aperas dekfoje en jaro (krom libertempo.)
La redakcio rezervas al si la rajton aranĝi la artikolojn por preso kaj resendas manuskriptojn nepresitajn, se poŝtmarko estis almetita; artikoloj originalaj estas preferataj.
Abono en Aŭstrio 3 K, por la fremdlando Fr. 3·75 = $1^1/_2$ Sm.
Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista en London. (Filio Dresden-Bankejo Arnhold.)

UPOZORNĚNÍ!

Vzhledem k zvýšení ceny tisku nemůžeme poskytovati nikomu „Časopis" za cenu sníženou. Pouze ten, kdo získá pět **nových** předplatitelů, obdrží jeden výtisk zdarma.

Doporučujeme všem přátelům dobré esperantské četby, aby obohatili svou knihovnu dosud vyšlými šesti ročníky „Časopisu Českých Esperantistů", které lze dostati za cenu sníženou: Roč. I., II., III., IV., V., po K 2·20 (pro členy B. U. E. po K 1·70), roč. VI. za K 2·50 (K 2·20). **Příloh bez časopisu nelze obdržeti.**

FUNEBRA SONORILO POR DR. DOR.

En la vojaĝlibron de prof. Pitlík skribis Oscar van Schoor.

Adiaŭ Dor, Doktoro Dor!
Arĝentaj haroj, koro d'or' —
Post longaj jaroj da labor'
Vi en eternon iris for.
Sed se nun mortis via kor'
Kaj tiun mondon lasis for
Spirito via tamen vivos
Por ĉiam, nia en memor'
Vi dormu, Dor,
Ripozu Dor
En tombo kun eterna glor'!
Nin akre premas la dolor'.
Ne velkos de dankem' la flor'
Ĝi kreskos dank' al nia plor'.
Ĝis ankaŭ sonos nia hor.
Kaj diras kore nia ĥor:
Dor, Dor, Doktoro Dor
Dolĉe dormu, dormu Dor.

J. A. Komenský (Comenius):

LABIRINTO DE LA MONDO KAJ PARADIZO DE LA KORO.

La filozofo trairas la mondon-urbon, en kies stratoj kaj domoj klopodas diversaj klasoj de la homa socio. Sed vidante ĉie nur hipokritecon, li perdas la esperon ĝis li fine rifuĝas en la domon de sia koro, kie lin Kristo milde akceptas kaj feliĉigas.

(Ĉapitro XVII.) PROFESIO DE SOLDATOJ.

(Homa krueleco.)

Tiam mi eniras en la lastan straton, kie jam sur la unua placo staras nemalmulte da homoj ruĝe vestitaj; al ili alpaŝinte mi aŭdas, ke ili intertraktas, kiel oni povus doni flugilojn al la morto, ke ĝi same de malproksime, kiel de proksime povu en unu momento penetradi. Ankaŭ, kiel oni povus en unu horo disjeti tion, kio estis dum multaj jaroj konstruata. Kaj mi ektimas pro tiuj paroloj; ĉar ĝis nun, kion mi ie vidis el la homaj faroj, ĉio estis traktado kaj laboro pri klerigado kaj plimultigado de la homoj kaj de komforto de la homa vivo: ĉi tiuj kontraŭe interkonsiliĝadis pri detruado de vivoj kaj de homaj komfortoj. La interpretisto respondis: „Ankaŭ la penado de ĉi tiuj celas la samon, sed laŭ iom alia vojo, precipe per forigo de tio, kio malhelpas. Pli malfrue vi tion komprenos."

(Arsenalo aŭ armilejo.)

. . . Dezirante vidi, kio estas en tiu kelo, mi tien eniras; kaj jen, tie estis ĉiuflanke, ke oni eĉ la finon ne povis vidatingi, ankaŭ sur la tero amasoj kiel la plej grandaj ŝtiparoj, tiel ke oni per multmiloj da veturiloj ne forportus ilin, da ĉiuspecaj teruraj — por pikado, hakado, tranĉado, fendado, batado, ŝirado, bruligado, sume por senvivigado — iloj el fero, plumbo, ligno kaj ŝtono, tiel ke teruro min kaptis kaj mi diris: „Kontraŭ kiu sovaĝa besto tiaj preparoj?“ — „Kontraŭ la homoj“ respondis al mi la interpretisto. — „Ĉu kontraŭ la homoj?“ mi rediras. „Ho, kaj mi opiniis, ke kontraŭ iu sovaĝa, furioza kaj rabia bestaro. Sed pro Dio, kia krueleco, se homoj kontraŭ homoj elpensas ĉi tiajn terurajojn!“ — „Ĉu vi estas tiel trosentema?“ li diras kaj ridas.

(Priskribo de batalo.)

Subite iu ekfrapas tamburon, kaj eksonas trumpeto kaj fariĝas bruo kaj krio! Kaj jen, ĉiuj rektiĝinte kaj ekpreninte tranĉ-, hak- kaj pikarmilojn, kaj kion ĉiu havis, ili puŝas tion senkompate en sin reciproke, tiel ke sango ŝprucas, ili hakas kaj batas unuj la aliajn pli terure ol la plej furiozaj bestoj. Jen kreskas ĉiuflanke bruado, jen aŭdiĝas hufofrapado de ĉevaloj, frotsonado de kirasoj, tintado de glavoj, krakado de pafoj, siblado de la preter oreloj flugantaj pafaĵoj kaj kugloj, trumpetado, tamburado, kriado de incitantoj al batalo, kriado de venkantoj, kriado de vunditoj kaj mortantoj; jen vidiĝas terura plumbohajlado; jen timiga fajrofulmado kaj aŭdiĝas tondrado, jen de tiu, jen de alia forflugas brako, kapo, kruro; jen unu trans la alia renversiĝas kaj ĉio en sango kunfluas. „Ho, ĉiopova Dio, kio okazas?“ mi diras. „Ĉu estas la mondo pereonta?“ Kaj apenaŭ rekonsciiĝinte, mi de tiu loko foriĝis, neniel sciante, kiel kaj kien, kaj iomete respirinte, sed tutkorpe tremante, mi diris al mia interpretisto: „Sed kien vi enkondukis min?“ Respondis la interpretisto: „Kia vi dorlotito! Tio signifas esti homo, havi la rajton atakmortigi.“ — „Kaj kion do ili faris unu al la alia?“ mi diris. Li respondis: „La estroj malpaciĝis, sekve la afero estis reordigota.“ — „Kaj ĉu ili tiamaniere repaciĝas?“ mi diras. Li respondis: „Kompreneble. Ĉar kiu decidus inter la moŝtoj, reĝoj kaj regnoj, kiuj ne havas super si juĝiston? Ili mem devas tion inter si decidi per glavo. Kiu pli bone kontraŭ la alia per fero ekskermas kaj per fajro ekfumas, tiu valorigas sian volon.“ — „Ho, barbareco! ho, brutaleco!“ mi diras. „Ĉu ne ekzistus aliaj vojoj por interpaciĝo? Al sovaĝaj bestoj, ne al homoj decas tiel paciĝadi.“

Ĉi tiu fragmento aperos en preparata broŝuro pri la vivo kaj signifo de J. A. Komenský.

KssP.

PRI ORHARA REĜIDO
KUN STELO SUR FRUNTO, SUNO SUR BRUSTO KAJ ĜISKUBUTE ORAJ BRAKOJ.

(*Popolrakonto, kiun la aŭtoro — s-o Fr. Ŝtupar — aŭdis antaŭ tridek jaroj kaj verkis laŭ notoj tiame faritaj.*)

(*Fino.*)

Li lasis do la fratinon ĉe bonaj homoj, iris sola al la reĝa kortego kaj petis servopostenon. La reĝo nomis lin sia persona servisto kaj baldaŭ lin tiom ekamis, ke li alparoladis lin sole: „kara filo".

Sed la akuŝistino, kiu estis sorĉistino, tuj sciis, ke la nova servisto estas la reĝa filo. Ŝi timis kaj tial ĉion rakontis al la maljuna reĝino. Ĉi tiu dungis la akuŝistinon, ke ŝi iamaniere malaperigu la knabon.

La reĝo aranĝis grandan ĉason kaj prenis kun si ankaŭ la novan serviston. En la arbaro, kie okazis la ĉasado, estis tiom da ĉasajo, kiom nenie aliloke, sed neniu povis ion trafi. Tiam la ĉasistoj ekvidis sur arbo birdon, havantan multspecan plumaron. Ĉiuj pafis je ĝi, sed neniu ĝin trafis.

„Provu ankaŭ vi vian feliĉon, kara filo!" diris la reĝo al sia servisto. Ĉi tiu alcelis, pafis, kaj la birdo alflugis sendifekta antaŭ lin sur la teron. La reĝo portis ĝin kun si en sian kastelon kaj metis ĝin en oran kaĝon.

Nun li alvokis la patrinon kaj la akuŝistinon kaj demandis ilin: „Ĉu vi povas imagi ion pli belan?"

„Vere belega; sed ankoraŭ pli bela ĝi estus, se en la kaĝon estus enmetita subtera floraro!" diris la akuŝistino.

„Sed kie ĝin ricevi?" demandis la reĝo.

„Neniu alia povas ĝin akiri, ol tiu, kiu kaptis la birdon," respondis la virino.

La reĝo venigis sian serviston kaj ordonis al li alporti subteran floraron. La servisto foriris kaj frapante per sia bastono la teron, alvokis la okpiedan ĉevalon.

„Kion vi deziras?" demandis la ĉevalo la reĝidon.

„Mi devas alporti subteran floraron, sed mi ne scias, kie ĝin serĉi."

„Estos tre malfacile ricevi ĝin," diris la ĉevalo. „La akuŝistino tial instigis la reĝon al tio, por vin forigi; sed ne timu, mi vin helpos! Iru al la patro, petu de li tri bovojn, dishaku ĉiun bovon je kvar egalpezaj partoj kaj per ĉio ŝarĝu min. Kiam ni

venos proksimen al la subtera floraro, tri leonoj sin jetos kontraŭ vi; ĝi estas la unuaj gardostarantoj. Sed ne timu ilin, ĵetu al ĉiu leono kvaronon da bovo kaj kvaronon inter ilin. Kiel pluaj gardostarantoj troviĝas tri drakoj. Ankaŭ al tiuj ĵetu po kvarono da bovo kaj kvaronon inter ilin. Kiel tria gardostaranto estas nur unu drako, sed li havas sep kapojn. Al tiu ĵetu ĉiujn kvar restajn pecojn. Per tio vi favorigos al vi la gardostarantojn. Sed vi ne devas preni tro multe, por ne kolerigi la gardantojn, kaj ankaŭ ne tro malmulte, por ke la patro ne koleru."

La reĝido faris ĉion laŭordone. Li elpetis de la patro la bovojn, dispecigis ilin, ŝarĝis la ĉevalon kaj, veninte sub la teron, kvietigis per la viando la gardostarantojn. Malantaŭ ili li ekvidis amason da multspecaj, altprezaj ŝtonoj. Li kolektis ĉiuspecajn juvelojn kaj portis ilin al la patro. La reĝo enmetigis ilin en la kaĝon kaj demandis la patrinon kaj la akuŝistinon: „Ĉu vi nun povas imagi ion pli belan?"

„Vere bela," respondis la akuŝistino, „sed mankas ankoraŭ io. (Se vi ĝis nun forglitis tra la kaptiloj — ŝi pensis pri la reĝido — nun vi certe estos kaptita.) Malproksime de ĉi tie troviĝas ensorĉita kastelo kaj en ĝi reĝidino kun oraj haroj, stelo sur la frunto, suno sur la brusto kaj ĝiskubute oraj brakoj. Se vi tiun akiros, ne ekzistos pli granda belaĵo sur la tero."

„Kaj kiu povus ŝin alkonduki?" demandis la reĝo.

„Kiu alportis la subteran floraron."

La reĝo ree venigis sian serviston kaj sendis lin al la ensorĉita kastelo. La servisto alvokis la okpiedulon, por ke ĝi portu lin al la dirita loko.

„Tie, bedaŭrinde, mi ne havas tiom da povo, por ke mi povu vin utile helpi. Sed mi donos al vi bonan konsilon; se ĝi taŭgos — bone, se ne — ĝi ankaŭ devos esti bona. En tiu kastelo ĉio estas ensorĉita, ŝtoniĝinta. Kiu deziras savi la belegan reĝidinon, devas iri en la kastelon kaj trifoje ŝin voki laŭnome; se ŝi respondos, ŝi estos savita kaj kune ĉiuj ensorĉitoj, se ŝi ne respondos, ŝtoniĝas tiu, kiu volis ŝin savi. Iru kaj stariĝu min sur fajrujon tiamaniere, ke mi sur ĝi havu ĉiujn ok krurojn, kaj vi mem stariĝu apud mi kaj voku!"

La reĝido faris tion laŭordone kaj vokis la unuan fojon.

Neniu respondo. La ĉevalo ŝtoniĝis ĝis la kolo.

Dua voko.

Ree neniu respondo. Al la ĉevalo ŝtoniĝis ankaŭ kolo kaj kapo, la reĝido ŝtoniĝis ĝis la brusto.

Tria voko.

Jen! De malproksime estas aŭdata agrabla voĉo, kaj tuj ĉio ekviviĝis: viviĝis la domanoj, viviĝis tiuj, kiuj provis savi la reĝidinon, sed ne sukcesis. Ĉi tiuj ĝoje iris hejmen, kaj la domanoj kaj la reĝido restis tie ankoraŭ ok tagojn. La reĝido deprenis sian ĉapon kaj montris sin en sia natura beleco. Kiel savinto de la bela reĝidino li fianĉiĝis kun ŝi.

Post ok tagoj translokiĝis tiu regno al la regno de la patro de la reĝido, kaj la reĝidino diris al sia fianĉo: „Ĉi tiun regnon ne donu al la patro, sed vi havu la vian, li la sian."

Kiom miris la reĝo matene, ekvidinte apud sia kastelo kastelon pli grandan kaj pli belan kaj multajn soldatojn ĉirkaŭ ĝi; li ne povis imagi, kion ĝi signifu.

La juna reĝo invitis la reĝon-patron, lian patrinon, la akuŝistinon kaj multajn nobelojn al tagmanĝo. Dum la manĝo demandis la juna reĝo la ĉeestantojn, admirantajn la belecon de li kaj de lia fianĉino: „Kian punon meritus tiu, kiu volus nin mortigi?"

„Morton!" oni respondis unuvoĉe.

„Vi do meritis morton," li alparolis la akuŝistinon kaj la avinon, „ĉar vi volis mortigi min kaj mian fratinon. Kie estas la fratino? Venigu ŝin!"

„Pensu pri ŝi, kaj ŝi tuj estos ĉi tie," diris la fianĉino, kaj tiumomente aperis la fratino.

Vidu, kara patro, kiom da jaroj jam suferas senkulpe mia patrino malhonorigan punon. Mi estas ja via filo kaj ĉi tiu orharulino estas via filino. Ĉio okazis tiel, kiel mia patrino tion promesis antaŭ la edziniĝo, sed via patrino kaj la akuŝistino volis nin pereigi. Oni tuj venigu la patrinon."

„Pensu pri ŝi, kaj ŝi tuj ĉeestos," diris la fianĉino. Kaj tiel okazis.

La reĝo ekkoleregis pro la granda krimo kaj kondamnis la du virinojn al mortpuno.

Baldaŭ poste oni festenis la edziĝon de la reĝa filo kun lia fianĉino, la savita reĝidino.

INFORMOJ PRI LA BOHEMA NACIO.

Opinio de prudenta Germano. Alfred Rossmanith eldonis verkon „Quousque tandem...", en kiu li trovas justa la egalrajtecon de nacioj. Li diras: „...Kiu scias la lingvon de alinaciano kaj uzas ĝin pro ĝentileco interparolante kun li, gajnas la fremdulon certe almenaŭ duone, se ne tute. Germanoj kaj precipe vienanoj devas ankoraŭ multe en tiu rilato lerni de la ceteraj nacioj en la aŭstria imperio. — Bohemoj estas nacio, kiu fiere povas aserti, ke

ĝi havigis al si inter la ceteraj slavaj nacioj ĉefan socialan kaj kulturan situacion. Ili estas por ni tre valora, fruktodona, kultura kapitalo, kiu estas destinita agadi ĉe solvado de la grandaj taskoj, kiujn oni povas nomi civilizacia malfermo de la oriento kaj de la sudoriento. Laŭ ĉi tiu vidpunkto apartenas al Bohemoj — tieldire — eŭropa rolo... Kaj kun tiu ĉi nacio ni, Germanoj, vivas en la plej plendinda malpaco."

Triumfo de la bohema kanto. Vastan intereson altiris penetranta sukceso de la kantista ĥoro de bohemaj instruistoj el Praha, kiun ĝi rikoltis ĉe sia artista rondvojaĝo tra Belgujo kaj Francujo. Estas neeble esprimi per kelke da linioj la entuziasmon kaj priskribi ĉiujn flatajn kritikojn, kiuj akompanis la kantistojn en Luxemburg, Liège, Namur, Lille kaj precipe en Parizo. Jen grandioza triumfo de modele organizita kaj per disciplino edukita unuiĝo, kiu estas nomata de la fremdlando la plej bela kantĥoro de la mondo! Jen triumfa vojaĝo de la bohema kantarto! Ni kore ĝojas pri la sukceso de kantistoj, al kiuj dankos la tuta nacio por la diskonigo de nia nomo fremdlande sur la kultura kampo.

Bohema teatro en la naturo. En pitoreska valo „Šárka" apud Praha estis aranĝita grandioza subĉiela teatro, la plej granda de tiu speco en la mondo. Dek mil sid- kaj ok mil starlokojn havas la amfiteatro. Sur la scenejo trifoje ludis 300 aktoroj kun granda sukceso la faman operon de bohema komponisto Bedřich Smetana „Prodaná nevěsta" (La vendita fianĉino). La ludoj estis aranĝataj de la Bohema Nacia Teatro. — Alia teatro (por 3000 personoj) estis malfermita en arbaro de Krč, nemalproksime de Praha, kie aktoroj-diletantoj prezentas bohemajn dramojn.

Favoratoj de Vieno. Ne estas nun pli favorata nacio krom — Albanoj. Senĉese tie restadas vico da pli mapli aventuremaj iliaj reprezentantoj de diversaj konfesoj kaj estas objekto de komplezema gastamo kaj de eksterordinara atentemo. Je honoro de ĉi tiuj maloftaj gastoj oni aranĝas festenojn en la urbodoma kelo, ekskursojn kaj kunvenojn, kie tiuj eminentuloj prezentiĝas kiel „niaj solaj, fidindaj amikoj sur Balkano". Kiel profunden penetris tiu ĉi balkana febro, plej bone pruvas la fakto, ke hieraŭ havis la konata „Leogesellschaft" sian specialan albanan vesperfeston. Ne ekzistas eble pli separatiĝema societo, ol ĉi tiu centro de la konservativaj nobeloj, ekleziaj altranguloj kaj katolikaj sciencistoj. Kaj en ĉi tiu rondeto parolis hieraŭ Leo Freundlich, eldonanto de „Albana Informejo", senkonfesa hebreo kaj estinta socialdemokrata deputito! Li parolis por efektiva kaj ne sole ŝajna aŭtonomio de Albanio kaj la tuta kunvenintaro entuziasme lin aplaŭdis. Ankoraŭ neniam ni aŭdis, ke la glora „Leogesellschaft" estus montrinta ian intereson pri la bohemaj katolikoj en Vieno, kvankam ili estas trifoje pli multnombraj, ol kiom estas da katolikaj Albanoj entute! Feliĉa Albanio! La afero ŝajnus vere ŝerca, se ĝi ne havus tre seriozan flankon. Jus hodiaŭ elkalkulas „Zeit", ke „la albania aventuro kostis al ni ĝis hodiaŭ pli multe ol unu kaj duonon de miliardo". Kiom ĝi kostos ankoraŭ? Kaj tio okazas en tempo, kiam la germanaj politikistoj penas finance ruinigi la reĝolandon Bohemujon.

(*Telegramo al „Národní Politika", 7. V. 1913*).

IOM DA INSTRUO.

Tacoma. Antaŭ nelonge eldonis Commercial Club kaj Chamber of Commerce en Tacoma (Washington) tre belan ilustritan verkon pri tiu ĉi amerika urbo. Aldoninte al la klarigoj anglaj paralelajn tradukojn esperantajn, ĝi atingas tiel multe pli facile sian celon — tutmondan diskonigon de la urbo. En bona memoro estas la decido farita en Tacoma la pasintan jaron, kiam oni alprenis por naciaj festoj la proponitan esperantan nomon: „Montamara festo". Pro speciala intereso de la teksto ni volas konatigi nian legantaron kun kelkaj el la klarigoj, kiuj sendube trovos inter ĉiuj bonan akcepton.

La Eŭropanoj, kiuj en la malnova mondo malofte vidas rapidan kreskadon de la urboj, ne povas havi ideon pri la rapida kreskado de urboj en okcidenta Usono (Unuiĝintaj Ŝtatoj de Norda Ameriko). Kiel fungoj elkreskas el la tero en unu nokto, preskaŭ tiel same rapide elkreskas la urboj tie ĉi. Takomo ne estas escepto. En la jaro 1900 ĝi havis 37.000 da loĝantoj; hodiaŭ la nombro estas 100 000. Antaŭ dektri jaroj Takomo estis malgranda, modesta urbo, rimarkinda nek pro beleco, nek pro grandeco, sed hodiaŭ ĝi staras kiel unu el la plej ĉarmaj kaj allogaj urboj de okcidenta Usono. La belaj hejmoj, la imponaj konstruajoj de la komerca kvartalo, la mirinda haveno, la belaj parkoj kaj la vere ideala klimato kombiniĝas por igi Takomon favorata loko por la hejmoserĉanto. Estas komuna scio, ke okcidenta Usono donas pli da oportunaĵoj al fremdulo ol donas aliaj partoj de nia lando.

. . . Super la panoramo de la urbo leviĝas giganta neĝokovrita pinto de monto Tacoma, kiu logas nekalkuleblajn vizitantojn ĉiujare. La irado al la supro (4427 m) estas serio da surprizoj: la vojo longa 60 mejlojn (100 km) kondukas tra natura ĝardeno „Paradiza Valo", kies beleco milfoje superas iun ajn manfaritan ĝardenon. La pejzaĝo havas orientan aspekton: nenie aliloke estas ĉielo pli blua, sunlumo pli brila, ombroj pli malhelaj aŭ nuboj pli blankaj. Kaj la tuta vidaĵo estas tiel vasta, ke oni ne kalkulas je futoj, sed je mejloj. Ĉirkaŭe en la valo estas strangaj floroj — pli ol kvar cent specoj. Unu el la ĉefaj plezuroj por la turisto estas la multaj akvofaloj kaj torentoj kun laktoblanka polvo aŭ verdbluaj pro mineraloj, kiujn ili portas. Tuj post la valo altiĝas la neĝa pinto mem, malvarma, dezerta, mistera, kun la neĝoj centjaraj, kiuj kuŝas sur ĝi. Monto simila al ĉi tiu estas simbolo de majesto, silento, morto. Ĝi estas perfekta arto. Sed priskribi ĉi tiun monton estas neeble. Vortoj estas senpovaj, bildoj malutilaj. Kiel klarigo estu dirite, ke la geografia nomo de la monto estas Rainier, sed ĉiuj Tacomanoj kaj multaj verkistoj kaj sciencistoj preferas uzi la nomon Tacoma, pro tio, ĉar ĝi estas malnova indiana nomo. Tacoma, Tahoma aŭ Tachobet signifas „nutranta mamo". (*Daŭrigo.*)

REVUO DE LA REVUOJ.

El kio konsistas la simpleco de lingvo? Ĉu el malmulthava vortaro? Ĉu el regula kaj facila gramatiko?

Kio igas la lernadon de la franca lingvo, ekzemple, tiel malfacila? Ĉu la lernotaj vortoj? Ĉu la terure malsimplaj, mallogikaj kaj strangaj gramatikaj reguloj?

La respondo ne estas duba: la tuta malfacileco de la franca lingvo devenas nur de la malreguleco kaj malsimpleco de la gramatiko.

Cetere ĉu iu ajn kuraĝus aserti, ke por scii lingvon oni devas koni la tutan vortaron de tiu lingvo? Ĉu ekzistas iu Franco, kiu konas (mi eĉ ne diras: scias) ĉiujn vortojn de la franca lingvo? Li venu kaj prezentu sin al la publiko, ĉar li estas montrinda fenomeno!

La kutima vortaro de franca kamparano konsistas proksimume el mil vortoj, dum fakte pli ol tridek mil vortoj estas nun uzataj en mia patra lingvo. Ĉu iu kuraĝus aserti, ke franca kamparano ne scias la francan lingvon? Klera Franco apenaŭ uzas kvar mil diversajn vortojn; kaj, se mi ne eraras, la vorttrezoro de Théophile Gautier, la plej vortriĉa franca aŭtoro, ne enhavas pli, ol dek mil vortojn. Ĉu pro tio, ke troviĝis en la franca lingvo eble dudek mil ofte uzataj vortoj, kiujn Théophile Gautier ne konis aŭ ne uzis, oni povas diri, ke li ne sciis la francan lingvon?

La afero estas ja tre klara: la longeco, pleneco de la vortaro de iu lingvo neniel influas ĝian facilecon. Ĉiu lernas nur tiujn vortojn, kiujn li bezonas. Se mi lernas Esperanton nur en celo ĝin uzi por vojaĝoj kaj ordinaraj korespondoj aŭ konversacioj, sufiĉos, ke mi konu ses- aŭ sepcent radikojn, kaj, kvankam mi konas nur tiujn sepcent radikojn, neniu povos diri, ke mi ne scias Esperanton tial, ke mi ekzemple ne konas la nomon esperantan de iu eĉ tre ordinara kuirilo, kies nomon cetere mi eble ne konas en mia patra lingvo!

Estas ja stranga manio, ke oni ĉiam volas postuli de Esperanto pli, ol de ĉiu nacia lingvo. Kial, por scii Esperanton, estus necese, ke mi konu la esperantajn nomojn de miloj da aferoj, kiujn mi ne scias nomi en mia patra lingvo?

Tamen estas urĝe necese, ke tiuj objektoj, tiuj aferoj, kies nomojn mi persone ne bezonas, havu tamen esperantan, interkonsentitan, difinitan nomon, ĉar, se mi ne bezonas ilin, aliaj personaj ilin bezonos, ĉu hodiaŭ, ĉu morgaŭ.

(El „La Revuo". VII. 8.).

El artikoloj de dana instruis'o s-o P. Zoffmann en Kolding, kiu faris dum la pasinta jaro esperantan studvojaĝon tra Bohemujo kaj Moravio:
„. . . mi havis bonan sukceson kaj ĉie multaj gesamideanoj bonege min helpis. Ili min akceptis en la stacidomoj, min akompanis al lernejoj kaj donis al mi multajn valorajn sciigojn, eĉ multaj gastemo min invitis por loĝi ĉe ili, kaj tiamaniere Esperanto ankaŭ min helpis ekonomie. . . . Dum mia tritaga restado en Praha mi krom la lernejoj vidis ankaŭ multajn interesajn kaj belajn konstruaĵojn kaj ŝajnas al mi, ke Praha estas unu el la plej vizitindaj urboj, precipe kaŭze de la multaj, malnovaj, mezepokaj konstruaĵoj. Vojaĝu tien kaj vidu!" ***(Danlando, 1912 n-o 5.).***

JAZYKOVÝ RÁDCE — LINGVA FAKO.

Králové a pravda. Římský císař Tiberius chybil kdysi v řeči. a gramatik Marcellus jej na to upozornil. Jiný učenec Publius Capito však podotkl: „Vše, co řekne císař, jest dobrá latina, aneb se jí za krátko stane.“ Ale Marcellus vážně prohlásil: „Římské právo občanské může císař uděliti lidem, ale nikoli slovům.“ — Než i císař Zikmund osoboval si takové právo. V latinské řeči, kterou pronesl r. 1415 na církevním shromáždění v Kostnici, použil slova „schisma“ (rozkol) v rodu ženském. Jeden mnich mu připoměl, že jest toto slovo rodu středního. „Od koho to víš?“ „Alexandr Gallus tak praví.“ „Kdo jest to Alexandr Gallus?“ „Učenec.“ „Nuže, já jsem císař, proto já mám pravdu!“ — Takto myslili i jiní králové a císaři, že potrou pravdu i tam, kde měla větší význam než-li zde. Ale „schisma“ zůstalo rodu středního přes vůli Zikmundovu, a pravda zůstane pravdou, i kdyby všichni císařové a králové proti ní vystupovali. *(Esper. překlad viz. v čís. 6.)*

El vivo de Eskimoj. La marondoj flosigas ofte arbotrunkojn el pli suda kontinento al la bordo de Grenlando. La eskimoj kolektas ilin kaj konstruas el ili siajn kabanojn. Ĉar ili ne havas vitron, ili faras la fenestrojn el glacio. Ili ankaŭ ne havas fornon,- per kiu ili hejtus la kabanojn. Lampo plenigita per oleo, sur kiu naĝas amaso da malgrandaj meĉoj, varmigas la ĉambron. Krom tio havas Eskimo peltojn, per kiuj li kovras sin. En somero li forlasas la kabanon por eklogi en tendo. Interesaj estas ankaŭ la enterigaj kutimoj de Eskimoj. Kadavron plene vestitan ili envolvas en felon, kiu servis al la mortinto pli frue kiel lito, al tio ili almetas ankoraŭ unu vestaĵon, por ke li havu provizon sur la alia mondo. Poste ili volvas ĉirkaŭ la kadavro ŝnuron, per kiu ili trenas la korpon sur la neĝo aŭ sur la tero kiel glitveturileton (ĉar ili ne ŝatas tuŝi kadavron) al loko, kie estas sufiĉe da ŝtonoj. Tie ili kovras la kadavron por ĝin protekti antaŭ hundoj, vulpoj kaj korvoj. La vivo postmorta estas por ili mondo materia. Al ĉasistoj ili metas proksime de la tombo glitveturileton, boaton kaj ĉasilaron: liajn hundojn ili sufokmortigas kaj lasas ilin jungitaj. Por virino ili metas al la tombo lampeton kaj lignan kadron, sur kiu ŝi sekigadis la piedvestaĵon kaj la gantojn: ankaŭ pladeton aŭ poton por degeligado de neĝo, iom da graso kaj da alumetoj, por ke ŝi povu kuiri; ankaŭ kudrilon, fingringon kaj aliajn kudrobezonaĵojn. Ili ankaŭ kutimis sufokadi suĉinfanojn kaj meti ilin kun la patrino el la tombon, por ke ŝi ne sentu doloron pro ilia foresto. Tendon, kie mortis Eskimo, ili poste forlasas.

Printempo. La vintro jam pasis. La suno brilas denove pli varme. Glacio kaj neĝo delegas. Kampoj, herbejoj kaj ĝardenoj verdiĝas. Floroj kaj herbo reaperas sur la tero. La birdoj revenas el sudaj regionoj, konstruas al si nestojn kaj ĝojigas nin per sia agrabla kantado. La homoj eliras en la liberan naturon por tie labori. La kampisto plugas la teron, la ĝardenisto ĉirkaŭtranĉas kaj greftas la arbojn, refosas la bedojn, enmetas la semon kaj pli poste sarkas malbonan herbon. La infanoj petolas kaj ludas. Ni povas refoje promenadi inter la kampoj kaj en la arbaro. Anasinoj kondukas sian idaron al lageto, kokidoj vigle kuradas sur korto. Abeloj forlasas abelujon kaj kolektas el floroj polenon kaj dolĉan sukon. Gaje klaketas la muelejo apud la murmuranta rivereto. La tagoj plilongiĝas, la noktoj fariĝas pli kaj pli mallongaj. La ĉielo estas blua. Estas printempo.

ORBIS PICTUS — LA MONDO EN BILDOJ.

(*J. A. Komenský — Comenius: 1654.*).

KVĚTINY. Mezi kvítím jsou nejznámější: na jaře fialka, hyacint, narcisek; pak lilie bílé i žluté a kosatec; posléze růže, karafiát a j. Z těchto vijí se věnce a kytice. Přidávají se též byliny vonné, jako: majorán, laskavec, routa, levandule, rozmarina, mateřídouška, šalvěj, máta atd. Mezi polním kvítím nejznámější jsou: konvalinka, nezabudka, chrpa, heřmánek a j. v. Mezi bylinami jetel, pelyněk, šťovík, kopřiva atd. Tulipán jest okrasa kvítí, ale bez vůně.

LA FLOROJ. Inter floroj estas plej konataj: printempe violo, hiacinto, narciso; poste lilioj blanka kaj flava kaj iriso; fine rozo, kariofilo k. a. El ĉi tiuj oni plektas kronojn kaj bukedojn. Oni aldonas ankaŭ herbojn odorajn, kiel: majorano, amaranto, ruto, lavendo, rosmareno, timiano, salvio, mento, ktp. Inter kampaj floroj estas la plej konataj: konvalo, miozoto, cejano, kamomilo k. a. Inter herboj trifolio, absinto, okzalo, urtiko ktp. Tulipo estas ornamo de floroj sed sen odoro.

ZELENINY. V zahradách rostou zeleniny, jako: locika, kapusta, cibule, česnek, mrkev, řípa, řetkev, křen, petržel, okurky, melouny, tykev.

LA LEGOMOJ. En ĝardenoj kreskas legomoj, kiel: laktuko, sabeliko, bulbo, ajlo, karoto, rapo, rafano, kreno, petroselo, kukumoj, melonoj, kukurbo.

OBILÍ. Některé obilí roste nad stéblem v kolínka rozděleném, jako: pšenice, žito, ječmen; klas těchto má buď osiny nebo jest tupý a chová zrna v šupině. Jiné obilí na místě klasu má latu, nesoucí zrna po svazečkách, jako oves, pohanka. Luštěniny mají lusky, které zrní v luštinách zavírají, jako hrách, bob, vikev a těchto menší čočka.

LA GRENO. Iu greno kreskas super la tigo dividita per nodoj, kiel: tritiko, sekalo, hordeo; ilia spiko aŭ havas aristojn aŭ estas senarista, kaj tenas grajnojn en glumo. Alia greno anstataŭ spiko havas paniklon, portantan grajnojn en fasketoj, kiel aveno, milio, poligono. Legumenozoj havas legumenojn, kiuj enfermas grajnojn en ĉeloj, kiel pizo, fabo, vicio kaj lento, kiu estas malpli granda ol ĉi tiuj. (*Daŭrigo.*)

Z CELÉHO SVĚTA.

Kongres v Bernu (24.—31. srpna 1913). Účastníkům tohoto sjezdu se doporučuje vyžágati si již nyní potřebné tiskopisy a objednati současně s legitimací (cena 15 Fr.) i byt (4 třídy po 43, 33, 29 a 20 K se snídaní a po 60, 48, 36 a 26 K se stravou na šest dní). V tisku jest Kongresa Libro; právě byly vydány dva druhy pohlednic (po 10 ctm.) a vkusné nálepky (cena za 100 kusů 1 Fr.). Krom plesu připravuje se esp. divadelní představení původního švýcarského dramatu „La patreco“. Podle posledních zpráv súčastní se kongresu též Dr. Zamenhof se svou rodinou.

Přednáškové **turné o Esperantu** a o světovém svazu U. E. A. koná nyní Edmond Privat po universitách Spojených států. Byl přijat v Bílém domě presidentem W. Wilsonem, který vyslovil sympatie našemu hnutí, směřujícímu ke sblížení národů. Rovněž státní sekretář Bryan přijal Privata a slíbil, že Spojené státy budou officielně zastoupeny delegátem na IX. kongresu v Bernu.

Učitelstvo a Esperanto. Prvně sešli se ze všech končin světa v srpnu r. 1905 (v Boulogne sur Mer) příslušníci různých národů, kteří po celý týden hovořili jedině Esperantem a dokázali tak, že není možno pochybovati o jeho jsoucnosti. Mezinárodní kongres v Boulogne sur Mer byl počátkem řady každoročních sjezdů. Tak pomalu, ale důsledně zaujímá Esperanto místo v kulturním životě národů. Učitelé esperantisté sešli se až při třetí esperantské manifestaci v Cambridge 1907. Sešlo se více než 50 osob z řad učitelstva českého, anglického, belgického, ruského a skotského. Tam dán podnět k založení „Mezinárodního svazu učitelstva", jehož cílem jest: 1. Každoročně vydati adressář esperantských učitelů a žáků. 2. Vydávati esperantskou knihovnu mládeže. 3. Usnadňovati cesty žáků s učitelstvem. 4. Organisovati korrespondenci mezi žáky a učitelstvem. O IV. sjezdu esperantistů v Drážďanech (1908) založen byl zmíněný spolek a přijato vydávati „Mezinárodní paedagogickou revui" (Internacia paedagogia revuo), jako oficielní orgán svazu. Funkcionáři svazu jsou: dr. E. Boirac, rektor university v Dijoně (Francie), čestný předseda; univ. prof. Th. Cart (Paříž), předseda; prof. Maréchal (Anglie), místopředseda, prof. H. Zapater (Kolín n. R.), místopředsedkyně; F. Durieux, ředitel škol v Lille (Francie), jednatel a J. Jacobs, učitel v Antverpách, pokladník. Není bez zájmu prolistovati měsíčník učitelů-esperantistů. Zvláště upoutá zrak náš rubrika dopisovatelů. Zde kolega francouzský nabízí kolegovi českému, že může u něho zdarma tráviti prázdniny, dovolí-li jemu totéž v roce příštím. Jinde mladá učitelka severní horské části Norska prosí o výměnu nerostů, motýlů a jiných přírodnin. S radostí odpovídá česká učitelka anglické kolegyni, že bude jí zasílati pohledy našich národních krojů, prosíc zároveň, aby tato opravila jí anglické lekce. Není zde místa na vypočítávání všech těch příjemností a užitku četby mezinárodní paedagogické revue, jedno jen je jisto, že přijde čas, kdy učitelstvo celého světa musí se pevně sjednotiti a utvořiti velký kruh rodinný. Zajímavý článek slč. Julie Šupichovy končí apelem na české učitelky, aby věnovaly krátký čas potřebný k naučení se této lehké mezinárodní řeči a samy se přesvědčily o všem, co v krátkém svém článku pisatelka mohla pouze načrtnouti. — „Internacia Pedagogia Revuo" vychází v Antverpách (444 Boomsche Steenweg) Ročně K 3·60.

(*Julie Šupichová*: *„Časopis Českých Učitelek"*).

Ve Velké Britanii upoutalo Esperanto pozornost veřejných činitelů, hlavně z kruhů výchovných. Po přednášce předsedy britského svazu esp. a na doporučení H. Heldemanna, člena školní rady Middlesexské, bylo zde nyní zavedeno E. do škol na zkoušku. Podobně i šk. rady v Hastingsu a v Peuge přijaly Esperanto do učební osnovy. Významným jest též známý pozdrav rozeslaný „Oxfordským výborem k utužení mezinárodního míru a přátelství", v němž zasedají vynikající universitní učenci. Projev ten, adresovaný všem vysokým školám celého světa, jest psán anglicky, latinsky a esperantsky! Za člena britského svazu přihlásil se též Henry Jackson, professor řečtiny na univ. Cambridgeské a Gilbert Murvay, prof· uuiv. Oxfordské, známý v anglickém světě svými překlady řeckých dramat. Tento píše: „Vždy mě zajímal problem umělého jazyka pro styk mezinárodní a plně obdivuji system dr. Zamenhofa. Jeho řeč, tak jak jest, je nejvybranější a nejkrásnější dílo." Takový výrok může získati v kruzích učenců zaslouženou úctu Esperantu.

ESPERANTA MOVADO INTER BOHEMOJ.

„**Manifestační sjezd** českých Esperantistů ze Slezska a z Moravy" pod protektorátem Ústř. Svazu B. U. E. svolá „Slezský Klub Esperantistů" v neděli, dne 6. července 1913 do Moravské Ostravy (Hotel Brioni). Informace: Esperantista Klubo en Radvanice", Slezsko.

Do knihovny Svazu „Ligo de Bohemaj Esperantistoj" byly přijaty následující knihy (viz seznamy v roč. III., IV., V. a VI.):

č. 125. Devjatnin: ***Propaganda piedvojaĝo al la oka kongreso*** (94 str.)
č. 126. L. C. Deslaurier: ***L' Esperanto Méthodique. Cours complet*** (105 str.)
č. 127. Dr. A. Fišer: ***Esperanta legolibro por lernantoj*** (113 str.)
č. 128. Turista societo: ***Vojaĝado tra Finnlando*** (64 str.)
č. 129. F. Schiller: ***Poeziaĵoj***, trad. kol. Zwach (32 pĝ.)

(Viz seznamy v č. 2. a v předcházejících ročnících). **Adresa knihovny nyní: Sinjorino Eliška Kočvarová v Rokycanech 33.** O podmínkách půjčování knih viz na str. 26. tohoto ročníku.

Našim přátelům, kteří nám sdělili, že jsou ochotni zasílati **zprávy o Esperantu** do českých časopisů, zašleme pokyny v nejbližších dnech.

* *

Přednáškové turné o Praze a o českém národě. Po úspěšně vykonané první části své esperantské cesty po Evropě, při níž navštívil 24 města, nastoupil prof. Pitlík dne 17. dubna znovu další cestu na evropský sever a východ.

25. přednášku konal dne 21. dubna v **Koldingu** (Dánsko) v „Höjsokehjemmet", středisku to posluchačů vys školy hospodářské. Bylo přítomno přes 130 účastníků, většinou členů Dánského učitelského svazu esper., který vzal na sebe úkol uspořádati tyto přednášky v Dánsku. Předseda koldingského spolku učitelského p. Juhl podal hostům n kolik informací o našem národě a přednášku překládal do dánštiny uč. P. Zoffmann, o jehož studijní cestě po českých zemích zmiňujeme se na jiném místě. Časopisy „Kolding Social-Demokrat" a „Kolding Folkeblad" uveřejnily obsažné referáty o Praze.

26. **Odense,** 25. IV Účast 200 osob. Překládal p. Andersen. Předn. uspořádaly v sále „Fyns Forsamlingshus" spolky: „Odense Esperanto Forening" a „Odense Fotografiske Amatörklub". V esp. klubu — píše prof. Pitlík — setkal se se třemi Čechy, s pp. Myslivcem, Grundem a Vítkem, jimž tamnější Esperantisté opatřili místa ve tkalcovnách. V průvodu Čecha p. inž. Dvořáka navštívil prof. Pitlík hospodářství a domkářskou školu nedaleko Odense.

27. **Kodaň,** 28. IV. Sál „Kvindelig Laesaforening" byl 300 účastníky přeplněn. Překládal p. Barnel. Přednášky uspořádaly: „Konversacia esper. klubo", „Societo de danaj Esperantistoj", „Danske Laerers Esp.-Forening". Osm dánských denníků věnovalo pozornost Praze a Čechám.

28. **Štokholm** (Švédsko), 4. V. Za účasti 400 osob přednášel prof. Pitlík v budově „Realläroverk", jejíž ředitelem jest Dr. Svedelins. známý paedagog švédský a vychovatel v rodině královè. Žáci reálky zapěli před a po přednášce švédské národní písně. Koncertní čísla na piané zahrála sl. E. Lindall. Překládal p. Rosengren. Mezi posluchači byl též Dr. Lundsteat, drvní knihovník

dvorní knihovny, který druhého dne s hrab. Stenbockem, druhým knihovníkem, ukázal prof. Pitlíkovi české památky odvezené z Čech Švédy za válký 30-leté. Publikace Sokola a českých Svazů cizineckých byly zařazeny do král. knihovny.

Vítaným hostem byl prof. Pitlík v tiskárně a redakci esperantského časopisu slepců „Esperanta Ligilo", kde slepci p. A. Thilander red. a sl. K. Höjerova, sekr. podali mu potřebná vysvětlení. Dvanáct slepců-Esperantistů vyslovili nelíčenou radost z jeho nenadálé návštěvy.

29. **Gefle** (Švédsko), 6. V. V „Arbetareföreningens salong" přítomno 450 osob. Překládal p. Lundgren z Hedemora. Na zpáteční cestě do Štokholmu prohlédl prof. Pitlík v Upsalské univ. knihovně „Codex argenteus". 10. V. navštívil klub esper. v Helsingforsu.

30. **Petrohrad, 17.** V. Přednáška (300 účastníků) byla uspořádána ruskou tělocvičnou jednotou „Sokol I." a navštívili ji členové jednoty „Sokol II.", polského kola, černohorského spolku, české kolonie a klubu Esperantistů; stala se tudíž dostaveníčkem slovanské společnosti a zároveň výrazem slovanské vzájemnosti. Obrázky, zvláště sokolské, vyvolaly bouři potlesku. Do ruštiny překládal z Esperanta p. N. Evstifeieff.

31. **Reval** (Estonsko), 19. V. Účast 300 osob. Do estonštiny překládal p. Rosenberg.

32. **Kiev**, 25. V. V Obchodní komoře (za účasti 200 osob) předeslal kap. art. Leon Illaševič několik informačních slov o cestě prof. Pitlíka a o důležitosti Esperanta pro informaci ciziny. Překládáno p. L. Levenzonem do ruštiny. Po přednášce cvičilo sedm členů ruského Sokola prostná cvičení loňského sletu — za vedení Čecha náčelníka p. Kovaříka a hud. doprovodu prof. Kotka, místostarosty Sokola. Vzorné cvičení jakož i krásné obrazy byly vřele applaudovány. „Čechoslovan" jakož i místní ruské časopisy, které vyslaly ku přednášce své zpravodaje, přinesly obšírné referáty.

Dne 30. května vrátil se prof. Pitlík do Prahy a připravuje pro naše přátele sbírku esper. vzpomínek, které zajisté budou našim čtenářstvem vřele přijaty.

BIBLIOGRAFIO.

La Nova Testamento de nia sinjoro kaj savinto Jesuo Kristo (613 pĝ. 10×14.). Eld. London Brita kaj eksterlanda biblia societo, Edinburg kaj Glasgow Nacia biblia societo de Skotlando. Prezo 2 K bind. — Pri ĝiu ĉi certe plej malkara esperanta libro skribas „Pola Esp.": . . . Nenie estas en la tuta libro trovebla la nomo de la tradukinto. Sed estus granda sendankeco de la samideanaro, se ĝi ne konus lian (aŭ pli ĝuste iliajn) nomon. Ilin ni devos same memori, kiel ni memoras la nomon de la tradukinto de Pentateŭko kaj Psalmaro. Esperantigis la Novan Testamenton el la greka teksto (de Nestle) Pastro J. C. Rust. Lin helpis multe lia edzino kaj s-o A. E. Wackrill, kiu kelkfoje legis kaj ekzamenis la manuskriptojn kaj presprovaĵojn. Kiel rezulto de ilia laboro estas stilo ĉarme simpla, flua, tia, kian oni kutime nomas biblia. Legante, oni forgesas, ke oni legas fremdlingvan tekston. . .

J. S. Machar: ***Benedek***; historia portreto el milito 1866.

Trad. prof. Rud. Fridrich. Eld. F. Karásek en Prostějov. 24 pĝ. Prezo 50 hel.

Benedek — nomo de forgesata aŭstria generalo, kies karieron, gloron kaj malvenkon interesplene pentris la konata bohema verkisto kaj poeto Machar. En la hodiaŭa militema tempo eĉ la pacifistoj tralegos kun plezuro ĉi tiun verketon. Machar, meditinte pri la eterna militemeco de la homaro, skizas portretojn de la armeestroj el tempo historia (Hannibal, Caesar, Napoleon) kaj de la novepokaj marŝaloj-scienculoj (Moltke, Oyama), parolas pri la vivo de heroa generalo, kiu estis sur sia posteno ĉiam en fronto de la soldataro. En la verko vibras kortuŝanta kompato kun tiu ĉi heroo, kiu ne povis sukcesi en cirkonstancoj, en kiajn oni lin metis. Historiaj momentoj el militoj kun Italujo kaj Rusujo (1848, 1849, 1859, 1866) reviviĝas sub la artisma plumo de Machar. Li komparas la vivon de Benedek al tiu de Kuropatkin: „Lia vivo memorigas flugon de raketo; ie el mallumo ĝi ekflugas, leviĝas siblante kaj kaj triumfe supren, okuloj de miloj kaj miloj observas kun admiro ĝian vojon kaj gloron, ĝi siblas kaj supreniras, kvazaŭ ĝi volus alteni sin ie en la ĉielo kaj fariĝi nova stelo, subite en alteco okazas la katastrofo, la raketo krakas, disŝprucas kaj estingiĝinta falas malĝoje al tero". — Pri la traduko mem ni diru, ke atenta tralego de la presprovaĵoj estus foriginta kelke da preseraroj kaj jam en la manuskripto estus korektinta alia leganto ol la aŭtoro mem, pli ol unu vorton. (Ekz. erare uzitaj formoj: komencas ofte anstataŭ komenciĝas; enuanta anst. enua; sin enuigi anst. enui; revoluciono anst. revolucio, triomfo anst. triumfo). Estas ĉiam rekomendinde montri la manuskriptojn al iu samideano, ĉar simila kontrolo en ĉiu okazo alportas tuj bonon al la afero kaj tio, kion oni povas korekti nur en pluaj eldonoj, povas esti korektita jam en la unua.

J. M. van Stipriaan Luiscius: *Karaktero*. Dua plivastigita kaj plibonigita eldono, tradukita laŭ la sesa eld. de la nederlanda originalo kaj kontrolita de la Esp. Liter. Asocio. Trad. J. L. Bruijn. Eld. Librejo „Espero" en Haag. (29 pĝ. 13×19.). Prezo 50 h. — Post detalaj konsiloj, kiujn donis al la tradukinto la membroj E. L. A. kaj el kiuj la aŭtoro ĉerpis laŭplaĉe por sia verko, aperas libreto leginda ne sole pro sia interesa enhavo sed ankaŭ pro sia bona stilo. La verkon oni rajtas traduki en ĉiun lingvon kaj vere meritas la ideoj de la aŭtoro la plej vastan diskonigon.

Marcel Cachin: ***Laborista klaso kaj socialismo.*** El la franca lingvo trad. L. Berland kaj L. Vergnaud. (19 pĝ. 13×21). Prezo 25 h. Eld. E. S. F. J. O., 49. rue de Bretagne, Paris. — La broŝuro prezentas bonstile tradukitan aron da sanaj ideoj pri la socialismo, ĝia progreso kaj celo.

Politika malliberulo. (18 pĝ. 20×28). Eld. Dr. Z. Marek, Kraków 8. ul. Wiślna. Dum la kongreso 1912 aperis tiu ĉi emociiga verko, kiu laŭjuste metas en la plej malbonan lumon la „justecon" en Ruslando. Legante pri la mortigado kaj sennombra turmentado de la politikaj arestitoj (ofte senkulpaj) ni travivas scenojn el la mezepoka inkvizicio kaj kun abomeno ni pensas pri la „feliĉo" esti regato de ŝtato tiel barbara. Ĉu simplaj protestoj de la tuta Eŭropo estos sufiĉe potencaj por eldevigi ĉe la rusa registaro, ke ĝi respektu la homan dignecon de siaj regatoj? Al eldoninto Dr. S. Marek, deputato de la aŭstria parlamento, ni devas danki, ĉar li uzis la plej taŭgan el la lingvoj — Esperanton — por diskonigi

ĉi tiujn faktojn. — La traduko povis esti pli bona; oni evitu formojn: skribado leteron (skribado de letero); atenti, por ke iradi laŭ takto (atenti, ke oni iradu); esceptoj (eltirajoj); oni ne donas tempon nek . . nek (oni donas); por ke la morton proksimigi (por la m proksimigi) ktp. (Tradukinda verko!)

Gvidlibro tra Graz (79 pĝ. 13×19) edonita sub aŭspicioj de „Stiria Esperantista Societo"· Graz, Wielandgasse 42. Prezo 50 h. — J. Robbie: *Gvidlibreto de Edinburgo* (31 pĝ. 11×14). Prezo 10 h. (Kongresurbo de la Brita Esp. Asocio 1915). — Turista societo: *Vojaĝado en Finnlando* (64 pĝ. 12×18). Kun karto de Finnlando. Eld. Esperanto-Asocio. Helsingfors, Kauppiaskatu 11. (Bele ilustrita kaj interese skribita. La verko estos sendita senpage al ĉiu delegito de U. E. A. kaj al vizitantoj de Helsingfors.) — Commercial Club and Chamber of Commerce: *Tacoma*. (32 pĝ. 21×27). Angla verko kun esperanta aldono. Belegaj kolorbildoj. (Vidu detalan recenzon aliloke.)

KULTURA NIVELO?

Ĉu la celo sanktigas la rimedojn? Negranda, sed tiom pli malĝentila estas la broŝureto, kiun sub titolo „Was geht den Deutschen das Esperanto an?" (Kial Germanoj interesiĝu pri E.?) skribis prof. Dr. Emil Bausenwein (Praha) kaj kiun eldonis la redakcio de „La Marto".

El la verketo speciale por ni interesa estas tiu ĉi parto:

„Fine estu ankoraŭ per malgranda ekzemplo montrite, kiel senteble nin malutilas en nacia rilato nia sindetenemo kontraŭ Esperanto. Bohemoj, al kiuj oni ne povas ja ĉe la plej bona volo riproĉi naciecan cedemon, ĵetis sin kun plena energio sur Esperanton kaj ankaŭ per tio denove pruvis ĝustan instinkton de junaj nacioj. Preskaŭ jam ne ekzistas plu eĉ unu bohema vilaĝo sen esperantista grupo, en Praha mem estas 12 bohemaj societoj esperantistaj kaj eliras 3 bohemaj esp. gazetoj. Per sistema laboro kaj miriga persisteco ili eluzis la mondrilatojn esperantajn kaj nun akiris jam tion, ke ĉie en la tuta mondo en la esp. literaturo de ĉiuj nacioj oni senĉese povas legi detalajn raportojn kaj artikolojn — kompreneble laŭbezone ŝovinisme koloritajn — pri la bohema nacio. pri „ĝia" belega patrujo Bohemujo, pri „ĝia" antikvoglora ĉefurbo „Praha", pri ĝiaj arto kaj literaturo kaj kompreneble antaŭ ĉio pri ĝiaj malamikoj la malbonaj Germanoj. Kaj ĉi tiuj informoj restos tute sen kontraŭdiroj — certe ne en intereso de la nacia reputacio, jam sen tio ne tro granda, kiun ĝuas en la mondo precipe la aŭstria Germano — se fine iom post iom ni Germanoj ne uzos por ĉi tiu nacieca batalo la samajn armilojn, kiujn disponigas Esperanto (La germana societo esperantista „Verda Stelo" en Praha tradukis esperanten kun konsento de la „Prager Ortsrat" filio de la „Germana Nacia Konsilantaro por Bohemujo" la bonegan broŝuron „Praha — la germana altlerneja urbo", kaj tiel leviĝos kontraŭ la mensogaj informoj pri la „bohema Praha", kiujn la bohemaj Esperantistoj disvastigis ĝis en la plej malproksima oriento, en „Japana Esperantisto"). Estas klare, ke kontraŭ tiaj, pro sia konsekvenco kaj disvastiĝo ekstreme danĝeraj kontraŭgermanaj intrigoj oni neniom sukcesos eĉ per la plej energiaj protestoj ie en Reichenberg (Liberec) aŭ Eger (Cheb).

Kaj eĉ se ne estus aliaj motivoj, jam ĉi tiu sola estus sufiĉe grava por ke ni dediĉu al Esperanto fervoran atentemon pro motivoj naciecaj, ĉar ĉi tie denove estas bezone ŝirmi la interesojn de la nacio, eĉ se ili nuntempe havus karakteron sole idean."

La aŭtoro pruvas per sia „propagandilo", vere unika de tia speco, ke li naive opinias pri la Germanoj, ke sole tiam ili uzos kaj akceptos noblan aŭ praktikan ideon — kia estas Esperanto — se ili povos per ĝia apliko ankoraŭ pli efike labori sur la „kultura" kampo kontraŭslava aŭ kontraŭbohema. Danke la pli noblan karakteron de ceteraj samideanoj germanaj estas jam pruvite, ke eĉ inter ili ne trovas laŭdon tiaspeca politika „propagandilo pri-esperanta". Recenzisto de la „Germana Esperantisto" s-o Ellersiek akceptu esprimon de nia estimo pro siaj vere senpartiaj vortoj diritaj pri tiu ĉi broŝureto:

. . . Due, estus vere pli bone, se la ekstreme akraj kaj ofendaj atakoj kontraŭ la bohemaj Esperantistoj estus ellasitaj. Per tiaj atakoj estos la reciproka kompreno, kiun celas Esperanto eĉ ne iomete helpata, malplejmulte en la lingvo- kaj nacioriĉa Aŭstrio. Tion mi opinias kiel bona Germano.

La kaŭzo, kial estas tiom da tamburado en la tendaro de ŝovinista politika partio germana, estas klara: ĝis nun la subprem-ataj nacioj — uzante sole siajn netutmondajn lingvojn — estis ignorataj de la mondo, ĉar la mondo, ne kompreninte ilian nacian lingvon, aŭdis sole vortojn da la pli forta nacio, de la reganta subpremanto, vortojn diratajn en unu el la tiel nomataj internaciaj aŭ tutmondaj lingvoj. Ĉiuj plendoj restis sekve senatentaj, senrespondaj kaj sole la kalumnioj trovis ĉie lokon. (Ni povas citi senfinan vicon da ekzemploj!) Sed nun, kiam per Esperanto malfermiĝas ankaŭ al la plej malgrandaj nacioj la tutmonda forumo, kiam iliaj voĉoj estas sekve ĉie komprenataj, kiam disponigas Esperanto al ili la saman eblecon por sin aŭdigi tutmonde, tiam valoriĝas la devizo „Audiatur et altera pars", tiam la mondo povas fari sian juĝon kaj ĝi kondamnos laŭ merito tiujn, kiuj ĝis hodiaŭ sciis sole kalumnii la prematan, persekutatan kaj por tiel diri mutan, sed tamen vivofortan nacion. Jen estas la kaŭzo, kial tiom da potitika ekscitiĝo ĉe profesiaj ŝovinistoj: timo antaŭ la justa, monda kritiko pri ilia ĝisnuna subprema laboro, pri la kalumniado kaj dissemado de malĝustaj informoj pri la malpli granda nacio. Kaj se ni estas ofendataj, se niaj leĝoj estas piedpremataj, ĉu mi ne havas rajton diri al la mondo veron? Kaj **sole veron** ni diras! Sinjoro profesoro doktoro Bausenwein montru al ni, kiam kaj per kio ni mensogis (kiel li skribas), informante la mondon pri nia nacia situacio! Ni pruvos al li per faktoj (se li ne volas mem koni ilin!), ke ĉio, kion ni skribas, bazas sur la plej justaj postuloj. Se li ne sukcesos pruvi la malon, tiam ni ripete citos al li la trafan kritikon de lia broŝureto („Germana Esp.") en kiu la cito pri falsaj informoj reaplikiĝas ankaŭ rilate liajn vortojn pri la honesta laboro de bohemaj Esperantistoj. — Ĉu apartenas en propagandan revuon, kia estas Ĉ. Ĉ. E., artikolo simila? Jes, ĉar alie ne estas loko por respondi en la nomo de bohemaj Esperantistoj, tiel grave ofenditaj. Ni konstatas: 1.) tia verketo refoje pruvos al la mondo konduton de fanatika ŝovinisto kaj 2.) ni ne malfermis la debaton kaj ni ankaŭ preferas ĝin eviti, uzonte la tempon por propagando kaj por pli intensa informado de fremdlando pri nia nacio.

NOVAJ GAZETOJ.

Vidu nomaron el 1912 sur kovrilo de la 1-a numero:

Revuo de la Esperanta Psikistaro (E.) 1 Sm. (K 2·40). Waltvilder par Bilsen. Belgujo.
Espero Teozofia (E.) 1 Sm. (K 2·40). Paris, 145. bd. Maleslierbes.
Homaro (E. hisp.) Madrid. San Bernardo, 96.
Grafologia Revuo (E.) Barcelona, Peu de la Creu 10.
Studenta Bulteno (E. aldono al „Esperanto". Luhačovice.
Junula Parolo (E.) 75 sd., kun aldono Sm. 1·250. Magdeburg, Moldenstrasse 19.
Konfidencialo (satira revueto E.) Sm. 1·500. Kiel, 17. Feldstr. Germ.
Bulletin Mensuel d' Information (E. fr.) Paris XIV. 11. r. Coulomiers.
L' Esperanto (E. fr.) Gand, 60 Bd. St. Liévin, Belgujo.
L' Esperanto (E. itala) duonmonata gazeto por instruo de la itala lingvo per E. (1 Sm.). S. Vito al Tagliamento (Udine) Italujo.
Bavara Esperantisto (duonmonata) — **Der Schwäbische Esperantist** (monata) E. germ. (Sm. 1·250). Schussenried, Germanujo.
The Esperanto Monthly (E. angla). Amerika eldono. (1 Sm.). U. S. A. Esperanto-Ass. Schaller, Iowa.
La Espero (E. sveda). 1 Sm. Gefle, 3—23. Svedlando.
Ĥina Socialisto (E. ĥina) ĉiusemajna. 2 Sm. Shanghai, 594. Yunnan Rd. Ĥinujo.
La Zemuna Esperantisto (E. kroata). S-o Jak. Schneider, oficisto. Karlovčić l. p. Šimanovci.
Riga Stelo (E. rusa). Riga. Krebstr. 11. Rusujo.

Novaj adresoj:

Amerika Esperantisto *nun*: West Newton, Boston, Mass.
L' Espérantiste Catholique *nun*: Paris-Montmagny, 7. r. de Marroniers.
Franca Esperantisto kaj Bulletin S. f. p. E. aperas *nun* sub **La Movado**.
La Dek Sepa *nun*: Paris, r. Raynouard 56.
La Ondo de Esperanto *nun*: Moskva, Lubjanski pr. 3.
Volga Stelo *nun*: Saratov, s-o Davidov, poŝta Kesto 12.
Ukraina Stelo *nun*: Kolomea, 360. Nova. Dir. Okuzma.

AL LA KARAJ SAMKLUBANOJ

en

Č. BUDĚJOVICE KAJ PLZEŇ!

Estinte nun translokita en alian parton de nia patrujo, mi ne povos plu partopreni Viajn kunvenojn, tiom de mi preferatajn antaŭ ĉiuj aliaj amuzajoj. Ĉar mi ne povis pro manko de tempo adiaŭi de Vi, karaj amikoj, mi uzas ĉi tiun okazon por esprimi al Vi elkoran dankon por Via amikeco al mi ĉiam montrata. Specialan dankon mi sentas min devigata esprimi al nia kara prezidanto, faka instruisto s-o F. K. Svačina, danke kies klopodon mi fariĝis Esperantisto. Mi deziras al ambaŭ kluboj feliĉan progreson en iliaj entreprenoj kaj certigas vin, ke mi restos en mia nova agadejo diligenta laboranto kaj fidela samideano.

J. Plánský
en Č. Budějovice.

KORESPONDANTOJ: *70. S-o Ramon Urgell, *Barcelona*, Sabadell, Str. Convento 90. H i s p a n u j o. (il. k.). — *71. S-o Bruno Kuberski, *Bochum*, Lothringerstr. 4. G e r m a n u j o (il. k.). — *72. F-ino Maria José Allen Souto, *Mathosinhos*, Alameda de Passos Manoel. P o r t u g a l u j o (il. k.). — *73. S-o Lucien Thevenin, *Feurs*, 13. rue de St. Etienne, F r a n c u j o (Loire). (Kor. france, angle, esperante). — *74. S-o K. V. Kuminov, de U. E. A. *Ishim*, Tobol. gub. R u s l a n d o (il. k., p. m., ĉiam al ĉiu resp.). — *75. F-ino Elisa D. P. Peeters, Pastorij. *Westmalle*, B e l g u j o (dez. kor.). — *76. S-o Dr. N. F. Botte, *Casteau, Belgujo* (p. m.). — *77. S-o Roose Robert, St. Denis, 11. rue Petit, F r a n c u j o (Seine). (il. k.). — *78. S-o A. Voznjesenskij, *St. Peterburgo*, Podolskaja 44, 6. R u s l a n d o. (Publikigas por 80 hel. adresojn de slavaj gejunuloj, kiuj volas korespondadi, en speciala adresaro. Sendu la adreson, profesion, nomon de la lernejo ktp.). — *79. S-o S. Pšenickij, *Wolkowysk*, R u s l a n d o (Grodna gub.). (Dez. kor. kun samid. bone scianta E-on. Sendas por 1 resp.-kup. 10 propag. glumarkojn.). — *80. Pri „Tutmonda" Junula Asocio" sendas informojn: Kontora „Mazut" (s-o Polack), *Kiew*, R u s l a n d o. — *81. S-o Nikolaj Karataev, *Kronštadt*, Alekseevskaja ul. dom. 7. kv. 1. R u s l a n d o. (ĉiam resp.). — *82. S-o J. M. Ulianov, *Charkov*, Balašovskij per. 6. R u s l a n d o (il. k., let., p. m., ĉiam resp.). — *83. S-o A. P. Belov, *Kostroma*, lesniĉestvo, Volga; kajo 91. R u s l a n d o. (petas por la esp. fako de la agrikultura ekspozicio esperantaĵojn). — *84. S-o Simeono Komarov, *Kostroma*, Soldatskaja ul. 32. R u s l a n d o (dez. kor. kun Sokoloj). — *85. S-o Simon Ukrtiĉjan, instruisto *Batum*, korsetejo „Espero", R u s l a n d o, Kaŭkazo (dez. skribi en armena lingvo verkon pri Bohemoj kaj volas loĝi dum du somermonatoj en Praha; rekompence por la loĝejo kaj nutrado li povas instrui pri la lingvoj rusa, armena kaj Esper. aŭ traduki rusen. La interesiĝantoj ekrilatu senpere.). — *86. S-o Nico Van Calsteren, *'s Gravenhage*, 50. Ged. Sloot, N e d e r l a n d o.

Eldonanto: **Ed. Kühnl.**

Presejo de Národní tiskárna a nakladatelství spol. s r. o. v Praze.